GISTO, SET-2007.
Redaktis - G.O.Vaske
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS.
ttt-kongrua skribo.

9999999999999999999999999999999999999999999999999999999999999999999999999999

EDZA DRINKEMO

Tra la tuta Brazilo, (chu en la tuta mondo?) multegaj edzinoj plendas pro la fikutimo de iliaj edzoj, pro drinkemo kaj ties nocaj konsekvencoj: mistrakto al al siaj hejmanoj kaj bestoj, dumnoktaj ronkadoj, misaj sintenoj , por ne paroli pri sanproblemoj kaj elspezoj kiuj kaùzas mankojn en la hejma mastrumado. Chefe emerituloj, preskaù daùre restas hejme kaj observas la rutinojn. Domo kie ne horlogxo postulas akuratan disciplinon por gxustatempaj altabligxoj, por la mangxoj, tie la edzoj provas pasigi la tempon dum ili enprenas aperitivojn, se ne necesan, do por mildigi la malsaton. Se la dommastrino havas helpantinon, sxi ne rekte kulpas pri prokrastoj de la mangxohoroj. Sxia devo estu do, iomete “pinchi” la inon kiu sxin helpas endome char longaj kaj tro oftaj prokrastoj enkondukas la plagon de drinkemo ankaù en edzinojn kiuj laboras eksterdome, se ankaù ili venas hejmen nur por tagmangxi. Cetere, validas aldoni, ke hejmo kie la helpantino ricevas ankaù la mision eduki la infanojn (kutime tio okazas), la gepatroj ne povos kontenti pri la konduto de iliaj dekjaruloj, memkompreneble. Se homoj, hejmaj helpantoj estus kleraj kaj altnivele edukitaj, ili certe havigus al si altnivelajn laborpostenojn, ili estus ne nur hejmaj servistoj. Mi asertas, ke grandparte vandaloj devenas el hejmoj kie mankis rigora gepatra edukado kaj Dio.

LETEROJ

Chu vi leteris al iu jxurnalo ensendinte pravigan tekston al samideano Victor Hugo Ribeiro el Pato Branco? aù al mia teksto aperigita en Correio do Povo? Pardonu mian acidon... vi lasas la selitan chevalo preterpasi sen eluzi oportunojn elstarigi la ekziston de Esperanto. Observu kaj konstatu ke aliloke la helpemo de homoj estas multe pli facile atingebla kaj tio ja ne estas bonkvalito de la gaùcharo!

GAJA HAVENO

Sukoplena kaj bele presita, gxi indas esti legata en la tuta mondo. Aldone gxi logas gastojn partopreni nian tradician Verda Kafo. Koran dankon, redaktoro Cezar! Kelkajn ekzemplerojn mi dissendis al geamikoj indaj pro ilia esperantista fervoro. Mi aldonis la prezon: kvitanci al la eldonanto ties alvenon.

REVENO

Nia plej aktiva amiko, Arno (Arrojo do Mejo) pasigis gajajn semajnojn kun siaj parencoj kaj gesamideanoj en la chefurbo Brazilja. Li revenis al la Gaùcholando 18/9. Mi esperas ke li jam resopiras revidi la VK-kompanojn kaj bonvolas rakonti al ni pri siaj pluraj agrablaj oportunoj interbabili kun geamikoj tie kaj ankaù en najbaraj urboj. Mi scias ke tie ankaù okazas chiumonataj eventoj ech kun artaj prezentadoj. Nia amiko Enivaldo PT2CA havis kontakton kun la gaùcha vizitanto.

MI ATENDAS

Reagon al mia invito: paga poezia prezentado.Ankaù kontribuo, laù mia propono, ke la Gisto-legantoj verku etan rakonton pri siaj plej angoraj travivajxoj, al niaj rondanoj. Neniu manifestigxis. Plachus al mi ekscii, kie mi eraris por ne meriti ech unu vorton pri mia propono. Tempomanko estas tro minca pravigo se konsideri ke tiaj “hejmaj taskoj” intense plifortigas memfidon en la la lingva uzo. Nia kara Ennio (Torres) spertis tion.Lastatempe li longe silentas. Mi esperas ke che li chio marchas ebene.

TUSO

Per la e-net mia filo Cid sendis al mi miraklan solvon kontraù tusado de infanoj kaj adoltaj homoj. Sciatas kiom turmentas nin tiu malsano, preskaù chiam post kiam oni superis gripon. La gorgxo restas raùka kaj ekscita. Tuso atakas chefe post kiam oni metigxis sub la lankovrilon, por ekdormi. Nu, vi scias kiom da semajnoj tiu plago ne forlasas vin. – Jen bonvenas (laù gxia teksto) 100% garantiita solvo ene kvin minutoj kaj daùro de multaj horoj. Laù la indiko, gxia efikeco estis hazarde eltrovita de Serchesplora Konsilaro en Kanado.

>>> Jen, kio farendas: antaù la enlitigxo oni sxmiru bonkvanton de la pomado en Brazilo konata per la komerca nomo VIK VAPORUP (facile trovebla en iu ajn apoteko) sur la plandojn de ambaù piedoj. Tuj poste oni surmetu sxtrumpojn. Kiu jam provis diras ke oni havas la komfortan impreson ke la piedoj estas volvitaj per dika lankovrilo, ke infanoj facile endormigxas.

La kuracilo estas chipa, do ne malvarmumigxu sed se tio okazos kaj tuso perturbos vian vivon, ne multekostas provi kaj pludiri la novajxon al geamikoj.

BRAZILA SUVERENO MINACATA

Chiu brazilano nepre devas sciigxi pri grava teksto diskonigata tra Internet, far csantos@abril.com.br,globaltours@terra.com.br kaj www.globaltours.com.br Aldone troveblas teksto utila por verki leterojn al konataj gravuloj, far Plínio Robson A. Panse. BV ne neglekti. Nepre legu la denuncon. Vi certe indignos pro la senskrupula agreso al la brazila Suvereneco. Vere, enestas pravigoj sed ne por akapari la richan Amazonion de Brazilo kaj partojn de najbaraj amazoniaj landoj. Gesamideanoj, la afero urgxas!! Kiu ne posedas komputilon tiu trovu eblecon ricevi surpaperan kopiajxon. Agu tuj!!

15-DEC-2007.

Kion GEA decidis pri la festa tagmangxo? Laù mi scias, la ejo de mi proponita por tiu celo, sabate ne servas mangxojn.

LIBROFOIRO/2007

Ne kredeblas, ke neniu GEA-ano havas sufichan prestigxon por konkeri brechon che iu stando, por vidigi sxildon kiu informas pri Esperanto kaj montri almenaù vortaron, por interesatoj.

ANTAÙZORGO

Se vi amas viajn nepojn/pranepojn, vi ne forgesas zorgi pri la chirkaùmedio. Certe vi metas dise en difinitajn rubujojn organikajn/ne-organikajn materialojn.Pro neglekto pri ilia bonfarto povas kulpi vi! BV specialan zorgon pri uzitaj baterioj, kaj gaslampoj. Rompitaj ili liberigas dangxeran gason.

Ridetu.

VIVOMINACO --- Telefono trilis nokte en policejo. Angora vocho petas helpon - Rapide venu chi tien...kato invadis mian hejmon! – Sed, kato?...do ne gravas. – Venu, venu tre urgxe…gxi tuj mortigos min. - Sed, kiu parolas? Mi, la papago!